*Franda Revuo Efemera Ŝatata de Optimistoj* **N-ro 2** *(45)*

# FREŜO

**La januaro 2017 jaro**

*La retrevuo estos senpage dissendota nur por ĉiuj kiuj volas ricevi ĝin* … n :-)

**styczen 2017 r**



*Mi trovis al vi en TTT-ejo*

# O P I N I O J

Mi legis kun intereso kaj ĝuo vian retrevuon **Freŝo** (n-ro 1/44) kaj "deklaras mian volon" ricevadi ĝin regule. Dankon!

Klaus Schlüter el Germanio

saluton kara Marian,
kore mi dankas pro via humora-satira revuo "FREŜO"!
Tio estas maloftaĵo en nia movado! Legante pri la karakteroj de turistoj mi vere amuziĝis.
Finfine mi kaŭzis akcidenton, kiam mi volis plusendi la revuon, ĉio malaperis...
Ĉu vi povus denove ĝin sendi al mi?
Por la venonta numero de la revuo vi ja havus temojn senfine:
- forfuĝo de Britio el EU,
- la anti-EU-grupoj en EU: Viŝigrad-Pakto, la grupo de eternaj ŝuldo-ŝtatoj (suda EŬropo),
- la nova presidento de USA, Tramp, post iom da konfuza sinteno, ĉiuj ŝtatestroj humilaĉe vizitos lin,
- la ĉefturko Erdogan ktp ktp. - ĉu vi kuraĝos?

Kore, via Verner Pfennig

**Mi volas ricevi la retevuon Freŝo.**

Joaquim J MARIANO
el Brazilo

Kara Marian,
Cu vi konas Masahiro Marco Ono, unu Japanio Esperantisto ki estis en Nepalo por kelakaj jaroj. Se vi konas lin, cu vi scias kie li estas nune? Mi volas renkonti lin.
Dankon por via helpo

**MALLAGanga**
gmalla@my.bcit.ca

*"Frosto" - bonega, mojosa kaj - laŭ mi - bone tradukita*

Kara Marian,
me ne trovis la vorton „mojosa" nek en mia „Okelmann" nek en „PIV"
Helpu min……………..
Salutas vin

Inge Bartling

**Re: retrevuo "FRES'O"**

Dankojn, mi ne povas suriri gxin, sed plusendis al la mialandaj du babiladlistoj.
Nur unu esperantistino anoncis sin gxis nun, kiu komunikis, ke la pagxo ne allogas, do ne interesas sxin.

Kore Adri Pásztor


**belega magazino; mi volonte plu ricevus**

Carlo Minnaja

**Marian, ĉu vi nepre devas siajn erotomaniajn kaj vulgarajn (obscenajn) preferojn eksponi en la Esperanto -retrevuo? "Freŝo" estas bele redaktita retrevuo kaj povus esti la proverba perlo sur la pola eldonscenejo kaj servi por popularigado de Esperanto en la junulara medio. Se vi decidus tute ŝanĝi la aspekton kaj temon de "Freŝo", kaj celi ĝin ĉefe al junularo kaj ne por obscenaj erotomaniuloj, tiam certe vi utilus al popularigado de Esperanto en Pollando. La retrevuo certe multe profitus pro tio kaj allogus amason da legantoj. La via iniciato reeldoni de "Freŝo" - domaĝe ke ne plu paperforme - indas la plej altan estimon. La enhavo bedaŭrinde - NE! Pripensu, ĉu ne valorus iom ŝanĝi la profilon de la revuo, tre bezonata sur la pola E-eldonmerkato, sed ADRESITA ĈEFE AL POLA JUNULARO, POR INSPIRI ILIN AL ESPERANTO.**

**Saluton - Kazimiro**
(Kazimierz Krzyzak)

HISTORIO DE L'HOMARO



Milo Manara






N-ro 2 / (45)

*Gramatikon mi ne konas kaj gazetojn ne abonas...*

*"ESTAS MI ESPERANTISTO" - Julio Baghy*

Se vi volus elŝuti antaŭan numeron de "FREŜO" kaj kontroli nombron da elŝutoj ĝis nun kaj spekti el kiuj landoj

musklaku unu el subajn ligilojn aŭ engluu en la ĝusta loko en retumilo

https://goo.gl/#analytics/goo.gl/TNJo7O/all_time

goo.gl/TNJo7O

---------------------------

*Se vi havus proponojn, materialojn por la sekva numero de ĉi revueto - skribu al mi:*

**fresxo@protonmail.com**
Skajpo: **marianzdankowski**

**Kunlaborantoj:**

*Eduardo KOZYRA*
*Adam FRENSZKOWSKI*
*Dorota BURCHARDT*
*Franciszek WITUCKI*

Recenzoj:
pri "FREŜO" ĉiam atendataj
*Mi petas kritiki -*
*speciale pro gramatikaj eraroj :-)*

*Se vi volus, ke ĉi-tiun belegan revueton ricevadu viaj geamikoj - sendu al mi iliajn ret-adresojn:*

**fresxo@gmail.com**
**fresxo@protonmail.com**

*Ĉefredaktoro:*
**Marian ZDANKOWSKI**
*poŝtel. +48 622 115 650; +48 (0) 604-079-141*

*Adreso: str. Limanowskiego 36 m 3,*
*10-343 OLSZTYN, POLLANDO*
*retadreso:* fresxo@protonmail.com
*Skajpo:* **marianzdankowski**

*Se vi volus instigi min ne nur pervorte (perforte):*

Bankokonto:
(IBAN) n-ro: PL 54114020040000380246602778
Ricevonto: Marian ZDANKOWSKI
Ricevontadreso:10-343 Olsztyn; Limanowskiego 36/3
BIC/SWIFT: BREXPLPWMBK
Bankadreso: BRE Bank S.A. INTERNET BANKING,
al. Pilsudskiego 3, 90-368 Lódz
SORT CODE: 11402004
Konto ĉe UEA: mzda-e

**Grave:**
*mi povas gvidi kvizo(j)n dum via E-arangô !*
*Vi kontaktiĝu min rilate al ĉi afero !*

**Sur la kovrilpaĝo:** **Se diboĉi...**
**Kun tri ! Ek!**
**Pli da amo!**
**Sama pek'**











# Al la ĉefredaktoro skribas:

*Ĝenerale la magazeno* **FREŜO** *plaĉas al mi, la komputila grafiko similas al la antaŭa. Bone, ĉar ĝi tute bele aspektas. Tio estas ĝuste magazeno tipe humora (ekz. la teksto "***Frosto***" - bonega, mojosa kaj - laŭ mi - bone tradukita), sen la materialoj ligitaj kun Esperantio. Mi bedaŭras tion, ĉar iom da informoj pri Esperantio estus bonvenaj. Almenaŭ unu aŭ du artikoloj aŭ informoj en ĉiu numero de la magazeno. Oni povus skribi ekz. pri la* **novkreita Parlamenta Grupo de la Lingvo Esperanto en Pola Parlamento** *aŭ pri aliaj eventoj, sciindaĵoj kaj aktualaĵoj el la esperantista mondo. Tio ne estas kritiko nur sugesto por la eventualaj ŝanĝoj en la magazeno. Se mi trovos iujn sciindaĵojn el Esperantio en Interreto, mi tuj sendos al vi por la eventuala enmeto en la sekvontaj numeroj de la magazeno* **FREŜO***. La tekstoj kaj "demotivaĵoj" estas bonaj. Plaĉis al mi la teksto pri nacioj, mojosaj estis la karikaturoj de politikistoj (malgraŭ ke ne ĉiuj aktualaj, ĉar probable estis i.a. la eksa kanceliero de Germanio - Schroeder, li estas hodiaŭ preskaŭ forgesita). Estus bonege, se same kiel en antaŭaj numeroj de* **FREŜO** *- sur la kovrilpaĝo aŭ ie en la numero aperus foto de bela esperantistino (mi memoras, ke estis tiaj fotoj en la antaŭaj numeroj kaj tio tre plaĉis al mi). Povas esti eĉ aktoj (nudpozoj), sed gravas ke tio estu la fotoj de esperantistinoj. Mi supozas, ke la kovrilpaĝa knabino (n-ro 1/44) ne estas esperantistino, tamen certe ŝi estas bela.*


Adam FRENSZKOWSKI (Pollando)

Se vi volus **hazarde** printi la revuon en via hejma ĉekomputila printilo - informu min kaj mi preparos fajlon sen verda koloro (tiam ĝi ne estos bezonata) por pli facile printi.

Se vi volus printi la revuon en profesia presejo - informu min ankaŭ kaj mi preparos bildojn kun pli preciza kvalito (fajlo kun la revuo estos pli granda sed kvalito estos pli profesia).

# PUTINA VIVO






**Diru - kion vi volas - pri la politiko de Putin, sed unu afero estas certa. Li vere scipovas esti konkreta!**



**Por Prezidento Putin oni prezentigis kan-didat-liston por ĉefrabeno de Moskvo. Li longe trafoliumas, ĉiam kaj ĉiam pli ruĝiĝas kaj finfine laŭte kriegas:**

**- Ĉu vi ĉiuj freneziĝis? Ja ili estas Judoj !**


- Kial Ukrainio devas pagi tiom multe por gaso?
**Putin: -** Ukrainio ricevas gason pli rapide ol Eŭropo - signifas, ke ĝi estas pli freŝa !




**Milito kontraŭ Ruslando**

Eŭropo kun 500 milionoj da loĝantoj petas helpon de Usono kun 320 milionoj da loĝantoj por ke defendi sin kontraŭ 140-milionloĝantara Ruslando.

HISTORIO DE L'HOMARO



*Milo Manara*

## Ĉi tie estas pli facile vivteni tagon

**Kiam enveturas trajno dum** du sekundoj tremetas la tero. Viro lasas bariereton pere de kiu li sekurigis la starpozicion. Li estas tre ebria, tre indiferenta. Lia plena de vundoj kaj cikatroj vango batas teron. Li kuŝas kvazaŭ tio estus lito, li estas trankvila.

**Du junuloj kun ladskatoloj** kun kokakolao rigardas demande unu la alian, junulino kovrita per tuko murmuras sub la nazo: „fiulo”, dume de la viro krom malbonodoro venas ankaŭ ronkado. Lia abundhara kolego ankoraŭ staras, sed momenton post momento stumblas kaj blasfemas: „kurva! kurva!” Tiun polan blasfemon oni ofte aŭdas sur la berlinaj stratoj, sub pontoj, en parkoj. Vespere ĝi aŭdiĝas tra aŭtoparkejo de la Orienta Stacidomo.

**Venas tien senhejmuloj** por tranokti. Ili dormas en malnovaj, malpuraj manteloj, en malpuraj dormosakoj, kiujn oni kovras per humidaj kartonoj. De la tero protektas ilin plastaj sakoj el IKEA. Estas ĉi tie ĉefe poloj. Tage ili amuziĝas surborde de Spree. Vespere, ebriaj, ili kverelas sur la parkejo. Ili kolektas malplenajn botelojn por ilin interŝanĝi, serĉas manĝrestaĵojn el rapidmanĝejoj, kiujn forĵetas junularo kaj … ŝtelas en ĉe la stacidoma superbazaro, kiun – paradokse – gardas la polo.

**Senhejmaj germanoj kaj** azilpetantoj, havantaj rajton esti en Germanio loĝas en rifuĝejoj. Krom tio kvin mil viroj, virinoj kaj infanoj vivas sur la stratoj de Berlino. Volontuloj, oficistoj kaj kuracistoj, kiujn provas al ili helpi asertas, ke ĉiu dua senhejmulo devenas de Pollando. Krozas inter ili rakonto, ke poloj formanĝis cignojn el la parko Tiergarten.

**La urbo, preĝejoj, la Ruĝa** Kruco kaj aliaj organizoj povas prepari por vintro nur 700 tranoktajn lokojn. Por aliaj minacas morto pro malvarmigo.

**Ili loĝas en humidaj kartonoj inter malplenaj boteloj kaj cigaredaj stumpoj. De monatoj ili ne sobriĝas. Dominika kaj Kristof dormas sur aŭtoparkejo de la Orienta Stacidomo. Ili estas nur duopo el 2500 de la senhejmaj poloj en Berlino.**

**Kial ili forlasis Pollandon?** Kiel ili vivas en Berlino? Je kio ili kalkulas? Mi revenas al la Orienta Stacidomo. Sur la aŭtoparkejo oni aŭdas interparolojn kaj sur la herbejo antaŭ ĝi – ridojn. Dek polojn sidas duoncirkle, preterpasas ilin tri rumanoj. Iom pli malproksimen parolas du latvoj. Foje-foje venas ĉi tien bulgaroj kaj ukrainoj. Malofte okazas kvereloj inter la nacioj. Ili prefere evitas koliziojn.


**36-jara Dominika,** patrino de du infanoj devenas el la suda Pollando. De tri jaroj ŝi senhejmas. – Nenie estas tiel facile travivi tagon kiel en Berlino – ŝi konstatas. – Mi ankaŭ ŝatas tiun urbon, mi ne revenos al la lando – rakontas 22-jara Kristoforo. Li fuĝis el malgranda urbeto proksime de Lodzo kiam li estis ankoraŭ lernejano. Sur strato li loĝas nur de duono de jaro.- Post militservo mi ne sciis, kion fari kaj oni rakontis, ke en Berlino estas sufiĉe multe da laboro – konfidas al mi 41-jara Rafaelo el la centra Pollando.

**Dominika rakontas**: ”Mia edzo havis monon, mi havis fakon kaj povis labori, sed mi restis hejme kun la infanoj. Mi komencis drinki kaj preni drogojn. Mi malzorgis la familion, oni forprenis de mi la infanojn. Mi volis forkuri de ĉio, do mi veturis al Berlino”. Dominika laboris en bufedo, sed ŝi senĉese malfruiĝadis do oni maldungis ŝin. La lastaj 300,- eŭroj ŝi dediĉis por vojaĝo al Vatikano. En Romo ŝi drinkis kaj amuziĝis. Ŝi povis dediĉi ĉi monon por pagi loĝejon kaj serĉi novan laboron, sed ŝi preferis amuziĝi. De tiam ŝi kolektas botelojn, ŝtelas kaj almozas.

**Pli multon ŝi rakontas** al mi angle, sed la detaloj pri la senbileta vojaĝo al Aŭstrio kaj Belgio ŝi rakontas jam en sia lingvo. Interpretas polino, kiu en Berlino sukcesis. Kiam ŝi finis 30 jarojn ŝi venis al Germanio el Mazurio. Ŝi havas propran firmaon kaj konas multajn polojn, kiuj ankaŭ sukcesis. Pasintjare en Berlino estis registritaj 107 mil da poloj.

*... al la paĝo 9...*

HISTORIO DE L'HOMARO



Milo Manara

# VERA VIVO



**Esploro**



Ĉefo



Eksa usona aktorino – „steleto” de pornografiaj filmoj, Heather Swift (konata kiel Holly Price), ĵus posedis la kapablojn tre superatajn tiun-ĉi branĉon de agado. Tiujare ŝi pasis la plej malfacilan juran (advokatan) ekzamenon en Usono.




**Malfacile disputi kun virino, kiu prezentas nerefuteblajn argumentojn.**




**Vera viro**

**neniam permesos ke iu ajn malhonorogis lian virinon**

HISTORIO DE L'HOMARO



*Milo Manara*

# JUNULARA VIVO

**Mi ne scias kial ĉiuj subaj ŝercoj estis markitaj en mia dosiero kiel "La anekdotoj de IJS"**

*(mi scias, ke estas hontinde, sed ili plaĉas al mi)*

**Kio estas ege glitema?**
- ???
- Sapita fiŝo en skatolo da muko...

**- Kiel oni povas rekoni** fajrobrigadiston civilvestite en granda amaso?
- ???
- Tre malfacile...

**Verda kaj turnas sin kun** grandega rapideco, kio estas tio?
- ???
- Rano en miksaparato.

**Kanibala infano enkuras la** domon:
"Mi estas malsata, malsata..."
Iom poste kanibala infano elkuras la domon:
"Mi estas orfo, orfo..."

**Kio strangas sur avinjo?**
- Aĉjo.

**Unu orelon eniras, alian** eliras, kaj tamen restas en via kapo, kio estas tio?
- Pioĉo.

**- Panjo, kial kuras paĉjo** tiom zigzage?
- Ne zorgu pri tio, nur donadu la kartoĉojn.

**Edzo venas hejmen,** kaj trovas la edzinon kun fremda viro enlite.
Li krias al ili:
- Kion vi faras ĉi tie???
La edzino al la deloginto:
- Mi menciis, ke li estas idioto...



**Kial kverelas helikoj?**
Ili ne povas decidi pri la loko de hejma amuzo.

**Kial estas bone por la** heliko?
Ĉar por li ĉiam estas malrapide kaj humide!

**- Kisu min kara flegistino!**
Ne eblas sinjoro!... Eĉ tio estas malregula, ke mi kuŝas sub vi!!!

**En la angulo estas io**, kaj ĉiam pli ruĝiĝas, kio estas tio?
- Bebo ludas kun razilo.

**Mi nur pigre skrapas mian** orelon per najlo...
... "Subite: silento"...


**Infano kuras en la** vendejon, kaj haste legas:
- "Du kilogramojn da brasikoj, tri kilogramojn da terpomoj, kaj atentu, ke la olda putino ne puŝu la pesilon per la fingro."

**Du putinoj staras en lifto:**
- Hej, kiom forta odoro de ĉuro!
- Pardonu, mi nur ruktis.

**Du kadavroj interparolas:**
- Ho, rigardu, putriĝas miaj intestoj!
- Mi ne vidas tion, mia okulo ne tiun direkton fluas...


**- Skeleto en arbusto,** kio estas tio?
La venkinto de la pasintjara kaŝludo...

HISTORIO DE L'HOMARO



Milo Manara

# VIRTUALA VIVO



**Sankta Jakobo Pilgrimanto**
**estas la patrono de batalo kontraŭ Islamo**










HISTORIO DE L'HOMARO



*Milo Manara*

# BERLINA VIVO

el la paĝo 5

**Al tio oni devas alkalkuli** saman nombron de germanoj de pola deveno. Tamen sen tiuj poloj ne povus funkcii hoteloj, klinikoj, komerco.
Homo fariĝas kutime senhejma pro iu dramo. Forpaso de la partnero, perdo de laboro, akcidento, depresio. Multaj tamen provas sin defendi prenas malrespondecajn decidojn.

**Dominika vendis** pasporton kaj poŝ-telefonon. Anstataŭ kolekti spertojn en laboro, ŝi kolektas ŝuldojn kaj monpunojn. Ĉe la kuracisto ŝi estis nur unufoje, kiam ŝi estis malliberigita pro ne pagitaj monpunoj. Somere ŝi dormas subĉiele, vintre estas diverse. Unufoje ŝi eĉ dormis en preĝejo, sed kutime sur la stacidoma parkejo. Du kilometrojn pli malproksimen en la kvartalo Kreuzberg Witold Kaminski agas en la oficejo de Pola Socia Konsilio. 69-jarulo venis en Berlinon en 1981 kaj de tiam li helpas al tiuj, kiuj ne scipovas mem aranĝi diversajn aferojn en forte burokratigita Germanio.

**La poloj havas ĉi tie siajn** rajtojn, ili estas civitanoj de EU. Ili rajtas libere profiti la germanan labormerkaton, nur iuj kiel Dominika kondutas malrespondece. Ili laboras postulatan duonon de jaro kaj poste atendas monasignaĵon/subvencion de la ŝtato. De tempo al tempo la poloj el la parkejo sobriĝas kaj trovas iun kontraŭleĝan laboron, sed tio estas erarcirklo. Kristofo, estinte 18-jara fuĝis el Pollando al Anglio. Tie loĝis lia patro, kiu same kiel preskaŭ unu miliono da poloj migris tien serĉi laboron. Kristofo ekkverelis kun la patro kaj revenis al Berlino. Li laboris kiel domgardisto, loĝis ĉe la kolego kaj perlaboritan monon dediĉis al amuzo. Same kiel centoj de aliaj junuloj, li ne pensis pri estonteco. Kristofo ne ĉesis amuziĝi eĉ kiam li perdis laboron kaj ne plu havis kie loĝi.





Iun tagon li vekiĝis ebria surstrate.

**- Mi drinkas ĉiutage kaj prenas ĉion alireblan: speed, crystal** – li rakontas. Eble dank' al tio li scipovas vivelteni frostajn tagojn kaj noktojn. Lastan nokton li dormis sur ŝtuparejo en dombloko. Hodiaŭ li ankoraŭ ne scias: - *Ĉiam io troviĝos* – li diras sentime. Tiu vintro estas lia unua vintro surstrate. Tiu senĉesa stato de ebrio kaŭzas trotakson de eblecoj. Drinkulo estas pli anemia kaj ofte eĉ ne sentas, ke jam havas frostvunditajn orelojn, fingrojn ĉe manoj kaj piedoj. Ĉiujare multaj senhejmuloj perdas vivon sur stratoj pro malvarmigo.

**En la urba tranoktejo** ĉe la strato Lehrter Strasse estas nur 120 lokoj, sed kiam venas frostojn oni akceptas eĉ ĝis 200. Pro manko tiom da litoj, homoj dormas kie oni povas kuŝiĝi. La urbo donas ne sufiĉan sumon da mono; sen bonvolaj donacantoj tiu loko ne ekzistus. – Kiam estas frosto ni demandas neniun pri identeco kaj deveno, ofte ni kolektas de sur strato ebriaj, malpurigitaj de vomitaĵoj homoj – rakontas Ortrud Wohlwend. En la tranoktejo fetoras dezinfektajn rimedojn. Ĉiam alvenas novajn senhejmuloj. Sur la muro blanka kruco sub kiu pendas slipo kun la nomoj de forpasintoj. Multaj poloj, pli multo ne atinginta la aĝon de 50 jaroj.

**Tamen tiuj el la parkejo** preferas ĝui liberecon. Ofte ili rifuzas oferatan helpon kaj elektas straton. Ili fidas al neniu. Multaj suferas malsanon de Korsakov, kies simptomo estas konfuzo de nuntempa memoro. Tion ili anstataŭas per elpensaĵoj, malveraĵoj.
En superbazaro ĉe la stacidomo antaŭ aŭtomato akceptanta malplenajn botelojn staras ĉirkaŭ dudek senhejmuloj. La aŭtomaton ne iritas fiodoro de la klientoj. Lasero senanime kalkulas botelojn kaj donas kuponon por kaso. Rafaelo kalkulas ricevitajn eŭrojn kaj konfidas antaŭ mi: - Mi klopodas ne drinki tro multe. Mi volas liberiĝi de tia vivo. Morgaŭ mi razos min kaj serĉos iun laboron. **Morgaŭ!**

## HISTORIO DE L'HOMARO



*Milo Manara*

# ALIA VIVO




Mi ne bezonas **nuntempan feminismon**, ĉar mi ne bezonas stultan movadon, por senti min (kaj ankaŭ miajn opiniojn) grava. Se mi renkontas simptomon de ŝovinismo, mi mem scipovas defendi min kaj plu fukcii kiel antaŭe. Lamentado pri la okazaĵo kondukas nenien.




**Se antaŭ la geedziĝa ceremonio via plejamata fianĉino tutege ne volas subskribi antaŭgeedziĝan financan kontrakton – do vi sciu, ke okazas io…**

**tre malbona.**




**"FEMINISMO...**

**...aperas en virina kapo nurnure tial, se la virino havis en sia vivo problemojn en rilatoj kun viroj. Aliaj kazoj ne ekzistas."**

Wojciech (Adalberto) CEJROWSKI




**Karaj Sinjoroj,**

**ekkonu la terminojn kiel: intercizo, vasektomio, DNA-patrecprovoj kaj psikologio. Kaj ne forgesu ilin ĝis la vivofino. Ĝi estas ununura savo en la mondo kiu fariĝas koncentrejo por viroj, kie virinoj havas pli kaj pli privilegiojn kaj ni havas pli kaj pli respondecojn**

(intercizo: antaŭgeedzeca havaĵ-kontrakto).




**Vera viro ne manĝas mielon, la vera viro abelmaĉas.**

HISTORIO DE L'HOMARO



Milo Manara

# NUNTEMPA VIVO

**Islando** estis konsiderita la plej liberala lando en la mondo se temas pri aferoj kiel seksa egaleco, minoritataj rajtoj kaj media protekto.

Grupo MoveHub preparis resumon bazitan sur la datumoj de la Monda Ekonomia Forumo. Nur malantaŭ Islando estis **Finnlando, Svedio kaj Norvegio.** La kvina loko apartenas al **Nov-Zelando**. La deka estas **Britio.**

MoveHub indikas ke Islando havas la plej malgrandan salajro-diferencn inter la seksoj en la mondo, kaj ankaŭ bone funkcias renovigebla energio. Nune 85% de energio en la lando devenas de la "verdaj fontoj".

---

En la **nederlanda** parlamento, ekestis leĝpropono, kiu antaŭvidas la legalizo de eŭtanazio por ĉiuj personoj super 75 jaroj.
La partio D66 volas, ke eŭtanazio estu legala por personoj kiuj ne volas vivi kaj havas "konstantan kaj superfortan deziron morti." Tia eŭtanazio estus farita de kuracisto aŭ flegistino, kiu devus unue serĉi duan opinion.
Nuntempe en **Nederlando**, eŭtanazio estas laŭleĝa nur por homoj kiuj estas mortige malsanaj. Kiel rezulto, kancer-pacientoj nombras ĉ. 70% profitas de la "helpa memmortigo".



Merkato Fakulo Grupo preparis rangon de eŭropaj landoj, kie ekzistas la plej favoraj laborkondiĉoj por laboristoj kiuj devenas de la medio: gejoj, lesbaninoj, ambaŭseksemuloj kaj transgenruloj (GLAT).
La unuan lokon en la rango prenis **Norvegio**, post ĝi estas vicigita **Finnlando, Belgio, Germanio kaj Svedio**. Ĝuste en tiuj landoj ekzistas la plej bonajn jur-sociajn kondiĉojn por gejaj laboristoj.
La plej malbona situacio laŭ tiu kom-par-listo estas en **Armenio, Makedonio, Azer-bajĝano, Turkio** kaj **Rusio.**"


---

La nombro de infanoj kiuj volas ŝanĝi sian sekson estis ĉijare en **Danio** ĝis 2 fojojn pli alta ol atendita - raportas la agentejo Ritzau. Kopenhaga kliniko de seksologio antaŭdiris ke en 2016. hormon-terapion uzos ĉ. 50 infanoj. Fakte, la volon esprimis 130 danaj neplenaĝuloj.
La **danaj** reguloj permesas doni specialan sekur-hormonon por infanoj, kiuj finiĝis nur 12 jarojn. Ekde la aĝo de 16j ili povas preni plenan hormon-terapion, kiu kondukas al ŝanĝo de sekso.

---

**Malta** parlamento unuanime aprobis leĝon kiu malpermesas kuraci gejecon.
Kiel rezulto, **Malto** fariĝis la unua lando en Eŭropo kun tia malpermeso. Instigi aŭ efektivigi ĉi tiun tipon de terapio estos monpunita per la ekvivalento de 5 mil. USD aŭ malliberigo ĝis 5 jarojn. Antaŭe, simila malpermeso estis lanĉita, interalie, en **Usono**, kie ĝi estas valida en 5

HISTORIO DE L'HOMARO



Milo Manara

# V E R A   V I V O










- Ĉu vi dormas, karulino? Mi dezirus iomete diboĉi…
- Ne, ankoraŭ mi ne dormas.
- Nu... do mi atendos...




**Mia peniso estas kiel dobermano.**
**La edzinon ĝi ne damaĝos,**
**sed najbarinon ĝi disŝirus.**

**Instrukcio:**


Kiel ĝuste varmigi manojn






**Vivu per hodiaŭa tago, ĉar hieraŭa ne revenos, kaj morgaŭa eble ne alvenos.**

HISTORIO DE L'HOMARO



**Milo Manara**

# EKSPERIMENTA VIVO

## La tempo de eksperimentoj

**Informagentejoj informas**, ke finna registaro enkondukas interesan eksperimenton, ĝi disdonos monon kontraŭ nenio, kaj precize kontraŭ tio ke oni vivas kaj ne laboras. Jam en la jaro 2015 oni povis tralegi, ke finnoj pripensas tiun solvon. En januaro 2016 oni skribis pri monsumo 1.000 eŭroj, kiun enspezus ĉiu mallaboranta finno. Poste la sumo evoluis al 800 eŭroj kaj nuntempe ĝi falis al 560 eŭroj por monato kontraŭ neniofarado.

**Oni devas aldoni** (bedaŭrinde) ke menciita monsumo ne alfluos al ĉiuj finnoj, sed lotumita grupo 2 mil senlaboruloj, kiuj estos observitaj. Se la observado donos pozitivan efekton (!) tiam ĉi ideon oni aplikos por ĉiuj senlaboraj finnoj.

**Por ke inventi tiun** ideon oni devas havi "fortan kapon". Ĝisnunaj ĉiuj saĝaj ekonomikistoj kaj konsilantoj de ministroj ege pensadis kiupretekste disdoni buĝetajn monojn kaj abrupte... tia novigaĵo! Montriĝas, ke plej malfacile elpensi, por ke pagi monon kontraŭ la nenio. Certas, ke eble jam nelonge nomumitaj al Ekonomika Nobel-Premio estos similaj registaraj iniciatoj kiel ĝuste la finna ideo de "baza rento", la pola elpensaĵo "500+" (por ĉiu infano), dana koncepto de "familia subvencio" aŭ la rusa "patrinec-kapitalo" (ĉ. 10.000 dolarojn por la naskiĝo de infano).



**Feliĉo**

**Konkurenco estos multe** pli granda, ĉar speciale en Eŭropo vivas tendenco por elpensadi "kiumaniere pagi por nenio" estas pli forta.

Tamen estas unu malagrablaĵo en la ĝenerala konsento rilate al disdonado de buĝeta mono. Antaŭ kelkaj monatoj similan koncepton de "baza rento" disputadis svisoj en sia lando, kiuj - kiel kutime ĉe svisoj - ĉi tiun koncepton devis findecidi dum referendumo.


**Kaj strange!...**

Post referendumo montriĝis, ke 78% de voĉdonantoj kontraŭis disdonandon de mono por nenio. Stranga afero pro kelkaj kialoj. Ĝuste al svisaj bankoj alfluas mono el la tuta mondo (ofte oni ne sciate de kie kaj... ofte eĉ longe ĝi kuŝas en svisaj bankoj). Pro tio svisoj devis imagi, ke mono kreiĝas (ricevas) el nenio.

**Tamen... ne!**

Plimulto da balotantoj agnoskis ideon disdonadi monon kiel utopia, malŝparema kaj malutila por ŝtatekonomiko.

HISTORIO DE L'HOMARO



*Milo Manara*

# VIRTUALA VIVO



**Mono – tio estas peko.**
**Mi prenos sur min tiun pekon.**




**Ĉefanĝelo Gabrielo:**
**Li estas tiu, kiu diktis al Mohamedo suraojn de la Nobla Korano.**

**Eskimo (inuito):** Se mi mortus havante neniam okazon aŭdi pri instruoj de Jesuo, ĉu Li sendus min en la inferon?
**Pastro:** Kompreneble ne. Ja tio ne estus via kulpo.
**Eskimo (inuito):** Kial vi do venus ĉi tie por tion diri al mi?







**Tamen la plej simplaj metodoj estas plej efektivaj.**






**Jesuo Akbar**
Jesuo estas potenca

HISTORIO DE L'HOMARO



Milo Manara

# BIBLIA VIVO

====
Kiel sin krucosignas matematikistoj? En nomo de Gaŭso, Rimano kaj Neŭtono, epsilon.
====
"Bonan tagon, ĉu vi volas paroli pri Dio?" "Mi aŭskultas, kion vi volas scii pri mi?"
====
El letero de apostolo Paŭlo al korintianoj… - "Fratoj!...Kiam fine vi respondos al mia unua letero?"
====
Ĉu vi scias, ke al ĉielo trafas maksimume nur 10% da virinoj? Tio ja estas jam desupre stabiligita. Se estus kontraŭe, do tiam tie ankaŭ iĝus infero.
====
Kontemplacioj aperas tiam, kiam atestantoj de Javeo vin vizitas.
====
Kiamaniere la duan de februaro oni povas trovi praktikantajn katolikojn sur la strato? Tiujn oni devas kun kandelo serĉi.

====
Nun mi jam estas certa: Paradizo estas la loko, kie ne estas vekhorloĝoj, gvidantoj kaj … hundoj.




====
Laŭ plej novaj esploroj pri DNA oni fiksis, ke virino estis kreita el ripo de serpento…

====
La Biblio instruas nin ami. Sed Kamasutro tamen kiamaniere.
====
La dektrian tagon de navigado Noa rimarkinte siajn filojn, ekkonkludis, ke certe ĥolere estas forgesinta pri io.
====
Ateistoj havas unu personon malpli, al kiu ili povus sin turni dum orgasmo.
====
Je la komenco nenio estis. Kaj Dio diris: estu lumo. Kaj nenio plu estis, sed tio estis pli videbla.
====
Jesuo estas lumo. La noktpapilioj certe estas Lin adorantaj.
===
====
Kiel sin krucosignas informadikistoj? En la nomo de Patro, kaj Filo kaj Sankta Spirito, Enter.

Esperantigis:
Edward Jaskiewicz

HISTORIO DE L'HOMARO




Milo Manara

# SPRITA VIVO



Se vi havas malfreŝan spiradon, do ĉiutage matene gargaru vian buŝon per miksaĵo konsistanta el duono da trinkpoteto de varma akvo, unu kulero da mielo kaj iomo da cinamo. Gargaru vian buŝon dum unu minuto. Post kelkaj tagoj de aplikado de tiu ĉi proceduro vi rimarkos, ke via spirado fariĝis pli freŝa.



Pakante sian bagaĝon antaŭ flugveturo, ne elektu valizon tro elegantan kaj aspektantan multekoste, por ke ĝi ne tiru la atenton de ŝtelisto. Ne elektu ankaŭ valizon tro detruitan, por ke laboristoj de fluglinio ne havu oportunan pretekston en la kazo de damaĝo dum la flugo.
Krom tio oni indas foti enhavon de la valizo antaŭ ĝia fermo, por ke poste facile kontroli, ĉu pakaĵoj estis traserĉitaj.



Se splito eniĝis haŭton ĉe vi aŭ ĉe via infano,
ŝutu sur ĝi la bakpulvoron kaj algluu la plastreton sur ĝi.
Post kelkaj minutoj la splito senprobleme mem eliĝos (eksteriĝos) haŭton.



Se forflua tubo en via lavujo estas ŝtopita, enŝutu en la elfluejon iometon da purigita sodo kaj poste enverŝu tien unu glason da aceto. Kiam oni ĉesos sibli, tralavu la tubojn per varmega akvo




Malsekigu viajn manojn per akvo. Nun vi senkompare pli facile elprenos (forigos) malgrandajn pecojn de ŝelo el disfendita ovo.



Prenu sur kulereton iom da mielo kaj poste enverŝu ĝin reen en bokaleton. Se sur supraĵo fariĝos kaveto – do, la mielo ne estas natura (tiu ĉi mielo estas falsaĵo), sed se sur supraĵo fariĝos piramideto – tio signifas, ke la mielo estas la plej altkvalita produkto.

HISTORIO DE L'HOMARO



*Milo Manara*

# DISTRA VIVO

**Profunda Distreco**

Sinjoro al la poŝoŝtelisto, kiun li ekkaptis je surtuta kolumo:
- "Mi kaptis vin, rabisto, ĉe la ŝtelado mem. Kion, diable, vi serĉis en mia poŝo?"
Ŝtelisto: - "Pardonu, bona sinjoro; mi estas tiel ofte en profunda distreco! Mi havis antaŭ malmulta tempo surtuton, kiu tute similas la vian, kaj mi pro eraro kredis, ke ĝi estas la mia."

**Konfido**

- "Avino, ĉu vi havas fortajn dentojn?"
- "Ne, mia malgranda amiko, bedaŭrinde mi ne havas eĉ unu denton."
- "Estas bone. Volu do kaŝi miajn nuksojn ĝis mi revenos."

**Logike**

- "Patro, ĉu la instruisto povas min puni por io, kion mi ne faris?"
- "Certe ne, mia filo!"
- "Nu, mi ne devas fari mian lecionon."

**Dentoj**

- "Ĉu vi havas ankoraŭ ĉiujn dentojn, mia sinjorino?"
- "Kial vi demandas tiel strange, mia sinjoro?"
- "Ĉar mi ne povas kompreni, kiel en tiel malgranda buŝo 32 dentoj trovas lokon."

**Pripensado**

- "Nu, mia filino, ĉu la sinjoro prezidanto ne faris ankoraŭ sian konfeson?"
- "Ho jes, patreto; sed mi petis de li la templimon da du tagoj por pripensadi."
- "Ho malsaĝulino! Dum du tagoj li ankaŭ ja povos pripensadi."



**La Estinteco**

- "Ĉu vi efektive ne edziĝos je fraŭlino Tereza? Ŝi estas ja riĉa, kaj ankaŭ ne malbela."
- "Sed ŝia estinteco..."
- "Mi certigas vin, ke ŝia estinteco estas senmakula kaj pura."
- "Ho amiko, tion ĉi mi kredas; sed ĝi estas tre longa..."

**Biletoj**

Li: - "Vespere ni tre agrable amuzos nin."
Ŝi: - "Kion ni faros?"
Li: - "Mi aĉetis tri kinobiletojn."
Ŝi: - "Tri? Kiu do akompanos nin?
Li: - "Mi aĉetis unu al via patrino, unu al via patro kaj unu al via frato."

**Ĉiam Rapide Sprita**


Karlson, ĉiekonata pekulo, renkontas sinjorinon Johanson, kiu, laŭ propra opinio, estas senerara.
Karlson: - "Estas ja senĉesa pluvaĉa vetero."
S-ino Johanson: - "Jes ja, tion ni havas pro niaj pekoj."
Karlson: - "Tiukaze, s-ino Johanson, provu plibonigi, ĉar ni aliaj turmentiĝas pro tio."

**Modela Edzino**

Amikino al alia:
- "Dum monatoj mi ne povis eltrovi, kie mia edzo pasigas la vesperojn. Hazarde hieraŭ vespere mi frue hejmeniris, kaj tiam evidentiĝis al mi, ke li estas hejme.


**Neniam Sola**
Okazis antaŭ nelonge:
- "Ĉu via mortinta amiko havis la kutimon paroli kun si mem, kiam li estis sola?", demandis la juĝisto.
- "Tion mi ne scias, respondis la atestanto."
- "Sed vi ja asertis, ke vi estas unu el tiuj, kiuj plej bone konis lin."
- "Jes, ĝuste tion, respondis la atestanto, sed mi neniam estis kune kun li, kiam li estis sola.

HISTORIO DE L'HOMARO




Milo Manara


# SENVORTA VIVO







HISTORIO DE L'HOMARO



*Milo Manara*

# Kial Usono fariĝu JAPANIO

de Barry Friedman

**Ĉiu, kiu vivas en la moderna mondo,** kaj ne estas kreskigita sub granita plejstocena dentita roko de grandega grandeco, devus kompreni fundamentan koncepton de homa ekzisto. **Ni devas transporti nin**. Tio estas vera ĉu la transportado estas per aŭto aŭ trajna sistemo aŭ aŭtobuso en Parizo, la "u-bahn-o" en Berlino, la ŝanceliĝantaj kaj oraj kaj oranĝaj tramoj nomitaj Deziro kaj Kanalo en Nouvelle Orleans (aŭ Nov-Orleano por la proletaro, kiu ne komprenis fluajn franc-kapablojn), la tramoj en Lisbono, Portugalio, portanta generacion de portugalaj kaj nordafrikaj islamaj kaj kristanaj rifuĝintoj al siaj libereco for de la bomboj kaj militoj de teruro faligitaj sur ilin per la senskrupula Usona reĝimo de oleofikomercistoj. La vasta trajnretoj de Japanio kaj Sud-Koreio estas superaj kaj starigis flamantan ekzemplon por la resto de la mondo. Ni bezonas fortajn trajn-rilatojn porti nin de laboro al alia laboro, familia fiasko al familia kunveno, geedziĝoj al entombigoj, intervjuoj al unuaj tagoj al emeritiĝo, la restoracio al



**Barry Friedman**
esperantisto, usonano
tradukis prozon al "Beletra Almanako"

**<u>Ndlr:</u>** La redaktoro havas neniun opinion rilate al ĉi novelo. Se ĝi plaĉos al vi - informu min kaj NUR tiam ni kontinuos ĝian aperadon

la Bolŝoj-a baleto, la prelego pri leninismo al la seksema partio en Chelsea-o aŭ la sudflanko de Ĉikago aŭ la orientflanko de Kolumbuso, Ohio, la plej mallumaj kvartaloj de urinoplenigita Sankta Francisko aŭ la Ĉin-kvartalo aŭ Rusa Monteto aŭ la varfo. Sed bedaŭrinde tiu vasta matrico de trajna efikeco mankas en la Uniuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko. **Jes, Novjorko havas la faman subteran metroon**, kiu ĵetas homojn de Brooklyn al Tajmskaro kaj la Bronkso kaj Harlemo kaj Malgranda Italio kun rapideco, sed ĝi estas malpura kaj superplena kun trampoj kaj narkotikuloj kaj senhejmuloj kaj sufokanta varmego en somero kaj neeltenebla malgaja frostigita Arkta malvarmeco en la vintro. Ĉikago havas sian El-on, kiu faras bruegon super la morna urbopanoramo de ukrainaj kaj polaj enmigrintaj familioj kaj afrik-usonanoj vivantaj per registara *asistismo* kaj pafantaj unu la alian ĝis antaŭ-tempaj mortoj en adolesko ĉar la hip-hop-a muziko produktita amase de la sondiskaj firmaoj diras ilin agi tiel en metoda modo por malrapide malpliiĝi la loĝantaron kaj ebligi, ke la *Iluminatio* kontrolu ĉiujn mondajn aferojn. La trajnsistemoj do estas danĝeraj kaj nekompetentaj.


*kontinuo al la paĝo 21*

HISTORIO DE L'HOMARO




Milo Manara


# STATISTIKA VIVO











La elcenta valoro rilatas al nombro de GMO-plantoj en la tuta areo de difinita specio. Por iuj ŝtatoj (Usono, Urugvajo, Paragvajo, Sud-Afriko, Kanado, Argentino, Brazilo) estis aplikita averaĝa valoro, se oni kulturas pli ol unu speco de planto

(GMO - Genetike Modifita Organismo).

HISTORIO DE L'HOMARO



Milo Manara

## Kial Usono fariĝu JAPANIO

de Barry Friedman

el la paĝo 19

**La normalaj ĉiuj-usonaj homoj** de ajna etna fono kiuj volas vivoj je paco kaj komforto do devas turni sin al la aŭto por iri ie kaj ĉie. La kuracistejo, la banko, la provizanto, librejo, muzeo, antaŭurba festo, urbocentra ceremonio, kolegia asocio-domo, judstudenta unio, hindia lingvoleciono, islama moskeo-observado de la zakat-o kaj la rigardo al Mekko de la mezokcidento de Usono. Tio estas tie, kie mia rakonto envenas.

**Mi estas intelekta, laborist-klasa, idiota, ĉiuj-usona, blank-rubema, juda entreprenisto** kiu ĉiam serĉas uzi tro da vortoj kaj enuigi ajn personon, kiu hazarde estas ene de la atingo de mia super-entuziasma buŝo elsputi malkaŝan intelektularo-ŝarĝitan sensencaĵon. *"Kiu estis pli radikala en la senco de la uzado de brutaleco propagi la komunistan sistemon en post-Cara Rusio? Ĉu Lenino aŭ Stalino? Lenino uzadis perforton elpeli la caron kaj carinon kaj iom Aleksandron kaj Anastazion... sed Stalino, post kiam li prenis potencon neniigis pli ol 20 milionoj el sia popolo en rapida movado je kolektivigo kaj industriigo. Bonvolu respondi do la demandon." "Ĉu la franca sonas pli ridinda ol la Somalia? Ambaŭ estas rapidemaj kaj nazemaj." "Ĉu la ĉina popolo aŭ korea popolo sonas pli henema kaj blekema? Ĉinio havas la komunistan sistemon malsuprenpasis de Markso al Lenino al Mao Tengo al Dao Pingo. Kial ne povis Ĉiango Kai-Ŝeko halti lian leviĝon en la ĉeflando kaj estis devigita disvolvi la liberan demokratian ŝtaton de Tajvano en malgranda insulo en la Sudĉina Maro? Generalego Ĉiango havis la subtenon de la Usona militistaro kaj financistaro por venki tiujn sendiajn komunistojn kaj li ankoraŭ perdis! Tio alkondukis al la katastrofaj militoj en Koreio kaj Vjetnamio kiuj kostas centojn de miloj de juna usonana, korea, vjetnama kaj ĉina vivojn. Ĉiuj sencele." "Kial Guglo produktas pli da rezultoj en baza serĉo ol Jahuo? Kial i-Pod-oj estas pli konvenaj ol la malgranda Verizon-a supremalfermanta telefono, kiun mi ankoraŭ uzas ĝis hodiaŭ en aĝo de tuta fido je ĉio ĉe la tuŝo de fingro?" "Kio okazis al la kirliĝado de la propa butero? Laborado la vojon tra vivo sen registara asistismo kaj stipendioj kaj registaraj disdonaĵoj kaj senkostaĵoj?" "Ĉu Usono velkos en malhelan eraon sub la ĉefeco de Donald J. Trump, nesincera entreprenisto sen senco de poluro kaj diplomatio?"*

Mi ŝutas tiujn demandojn sur ajnajn ĉagrenitajn kaj nekuriozajn najbarojn, kiujn mi renkontas en la buso, sur la strato, en la Madeleine franc-bistro sur North High Strato, en la Mozart-Café ĉe la angulo de Strato Morse apud la Teejay bifstekorestoracio kie oni povas ĝui superbajn patkukojn, laktoskuaĵojn, land-frititajn kokid-bifstekojn, ŝinkon, ĉion ajn, kion la ĉiu-usona apetito deziras.

HISTORIO DE L'HOMARO



# KARIKATURA VIVO






















HISTORIO DE L'HOMARO



*Milo Manara*

# JUDA VIVO

*<u>Enkonduko al la anekdotoj:</u>*
*Judaj religiaj studoj (***Talmudo***) postulas altan intelektan nivelon por kompreni la pensmanieron de la egzegistoj (<u>interpretistoj</u>) de la Biblio. Tiu pensmaniero nomiĝas hebree* **Pilpul** *(<u>"piprumado": akra interdiskutado</u> ). Ĝi estas speco de intelekta gimnastiko de la cerbo, konsistanta el teoriaj analizoj de hipotezaj situacioj. Homo, kiu sukcesas disvolvi tiun pensmanieron, povas tre facile krei humuraĵojn, ĉar en plejmulto de la ŝercoj oni trovas teoriajn analizojn de hipotezaj situacioj.*



**Dio kaj parkado**
Judo veturas en la centro de Jerusalemo kaj serĉas urĝe lokon por lasi sian aŭton. Li ĉirkaŭiras la centron longan tempon, sed senrezulte.
Subite, fariĝinte preskaŭ senespera, li levas la vizaĝon ĉielen kaj diras: "Dio, se vi nun aranĝos por mi parkejon, mi promesas ekde nun observi la Sabaton, manĝi nur laŭ la ritoj de la religio ("Koŝere") kaj observadi la devojn dum ĉiuj judaj festoj".
Tuj post kiam li finis la frazon li vidas liberan lokon por lasi la aŭton. Ĝoje li tuj rigardas supren kaj diras: "Ne gravas jam, mi jam mem elturniĝis"…


**Akcidento**
Rabeno kaj pastro veturas en la rapidvojo, ĉiu per sia aŭto. Okazas akcidento: ambaŭ aŭtomobiloj karambolis (koliziis) kaj preskaŭ plene detruiĝis. Sed la du Di-servantoj ("Di-amantoj") saviĝis. Ili eliras, staras kune ĉe la vojrando kaj trovas ke nenio okazis al ili.
La rabeno rigardas la alian homon kaj diras: "Vi estas pastro, ĉu ne?"
"Jes"
, respondas la pastro.
Rabeno: "Okazis al ni vera miraklo. Certe la Eternulo deziris ke ni renkontiĝu kaj fariĝu amikoj".
Pastro: "Povas esti".
Rabeno: "Mi opinias ke ni devas tosti pro nia saviĝo kaj je nia nova amikiĝo. Mi havas hazarde botelon da vino. Espereble ĝi ne estis detruita. Ĉu vi pretas drinki kun mi?"
Pastro: "Kial ne?"
La rabeno alportas el la veturila kofro bonstatan vinbotelon kaj ofertas al la pastro. Tiu ĉi drinkas iomete sed sekve de instigoj de la rabeno, li poste pli kaj pli drinkas. Sed la rabeno tute ne drinkas.
Pastro: "Kial vi ne drinkas ankaŭ?".
Rabeno: "Mi preferas unue atendi la policon."

**Senpage**
Tio okazis siatempe en Blank-Rusujo (hodiaŭ: Belaruso, Bjelorusio), en la juda vilaĝo.
La bonkora juda kuracisto instalis afiŝon ĉe la pordo de sia kliniketo: "Por malriĉuloj-senpage!"
Venis ĉe li malriĉa virino.
Kuracisto: "De kio vi suferas?".
Virino: "Mi tute ne suferas".
Kuracisto: "Kial do vi venis al mi?"
Virino: "Ĉar tio tute ne kostas mi diris al mi: kial ne iri por ke la doktoro min kontrolu? Eble li trovos ke mi havas iun malsanon...

**Haku!**
Abram sukcesis eskapi el la komunismo kaj elmigri Kanadon. Li trovis la eblecon labori nur kiel arbo-hakisto. La labordonanto konsideris lin ne taŭga.
- Ĉu Vi povas fari tiel pezegan laboron?
- Jes, mi havas grandan sperton.
- Pruvu! Kie Vi hakis arbojn?
- En Saharo.
- Ja en Saharo ne estas arboj!
- Jen, la pruvo..

**Ĉiuj anekdotoj arigis Josefo Shemer** (Israelo).

HISTORIO DE L'HOMARO



Milo Manara

# DORMA VIVO




**Ĉiujare cirkaŭ 30 mil homoj mortas dum sonĝo pro nekonataj kaŭzoj.**

**Bonan nokton.**

**Solvo el la paĝo nr. 22**

1. Liza Minelli
2. Rod Stewart
3. Penelope Cruz
4. Hugh Hefner
5. Pablo Picassor
6. Diego Armando Maradona
7. Pamela Anderson
8. Buster Keaton
9. Madonna

HISTORIO DE L'HOMARO

